

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Anstataŭ profesoro Charles Ecabert, kiu bedaŭrinde estas grave malsana, vi aŭdas Claude Gacond, kiu prelegas pri Hélène Monastier.

Post la unua mondmilito la svisa inĝeniero kaj matematikisto Pierre Ceresole decidis dediĉi siajn fortojn al la praktika realigo de la esperoj de la usona filozofo William James, ke iam ekzistu movado kapabla orienti la entuziasmon kaj heroisman sindonon de la junularo al konstrua paca celo. Tiam Pierre Ceresole organizis labor-brigadojn, kiuj grupigis volontulojn el plej diversaj landoj. Kaj tiel dum 25 jaroj tiu vigla pacamanto alportis helpon al pro katastrofojn ruinigitaj komunumoj, al malriĉegaj vilaĝanoj, al infanhejmoj, al subevoluintaj regionoj. Tiel naskiĝis la movado Internacia Civila Helpservo.

Unu el la unuaj helpantoj de Pierre Ceresole estis Hélène Monastier. Profesorino pri la franca lingvo, historio kaj geografio en knabina gimnazio de Lausanne, la lernejo Vinet, tiu virino dediĉis kun eksterordinara vigleco ĉiujn siajn apudprofesiajn okupojn al tio, kio povas unuigi la homojn. Kaj malgraŭ sia kripleco (ŝi lamis pro poliomjelito trasuferata, kiam ŝi estis nur 16-monata), malgraŭ sia kripleco, mi diris, ŝi partoprenis diversajn laborejojn de Internacia Civila Helpservo, kaj inter ili la unuan en Svislando, kiu okazis en Les Ormonts, en la Vaŭdaj Alpoj.

Unuigi : tio estas la ŝlosilvorto de ŝia vivo. En 1909 ŝi kreas la unuan kunvenon por gimnazianoj. Tiu kunveno grupigas junulinojn el la franclingvaj kantonoj Ĝenevo, Vaŭdo kaj Neuchâtel. Tiu kunveno estas la elirpunkto de gravega edukistara institucio : la restadejo de la edukistinoj de Vaumarcus, restadejo, kiu ludas altstaran rolon en la intelekta vivo de la svisa protestantismo. Ĝis 1962 Hélène Monastier aktive partoprenis la vivon de tiu movado.

Estas ankaŭ en la celo unuigi la homojn, ke ŝi tiel sindone partoprenis la vivon de Internacia Civila Helpservo. Kiam Pierre Ceresole mortis en 1945, ŝi kun kuraĝo transprenis la gvidadon de la movado. Grandega laboro atendis la internacian prezidantaron de la Civil-servo. La dua mondmilito ĵus finiĝis kaj miloj da gejunuloj alkuris al la Civil-servo por pruvi sian deziron partopreni al la konstruo de pli homeca mondo. Ŝi devis orienti la sindonon de tiu junularo al konstrua laboro, kaj tio ne estis facila tasko. Sed, dank'al ŝia bonkora firmeco kaj eterna gajeco, dank'al ŝia laborinstiga aŭtoritateco, la movado multe kreskis dum ŝia estrado, kiu daŭris ĝis 1952.

Kiam ŝi ekŝiĝis, malgraŭ siaj 70 jaroj, ŝi ne ĉesis labori. Ŝi retiriĝis en sian hejmon kaj redaktis tri penso-riĉajn librojn. En 1954 aperis jam la unua : *Paix, pelle et pioche* (Paco, ŝovelilo kaj pioĉo, historio de Internacia Civila Helpservo de 1919 ĝis 1954). Tiu libro, kiel diras ĝia titolo, rakontas la komencon kaj la kreskadon de movado, kiu certe fariĝas iom post iom unu el la angulaj ŝtonoj de la morgaŭa mondo. En venonta elsendo ni iam parolos pli detale pri tiu libro kaj pri la nuna disvolvo de tiu movado.

Poste, en kunlaboro kun la vidvino de Pierre Ceresole, ŝi trastudis la « voj-kajerojn » de la fondinto de la Civil-servo. Ŝi elektis la plej penso-riĉajn tekstojn kaj aperigis libron sub la titolo *Vivre sa vérité* (Vivi sian veron). Tiu libro montras la pens-evoluon de viro, kiu decidis dum ĉirkaŭmonda vojaĝo dediĉi ĉiujn siajn fortojn por la vero, kie ajn tio lin kondukos. Romain Rolland, parolante pri Pierre Ceresole, diris : « *Li estas la plej alta konscienco de Svislando. Tiuj konsciencoj savas la homaron* ».

La tria libro de Hélène Monastier estas verkita kunlabore kun Lise Ceresole, Edmond Privat kaj Samuel Gagnebin, profesoro en la politeknika universitato en Zürich. Tiu libro titoliĝas *Pierre Ceresole laŭ sia korespondado*. Se per la antaŭa libro oni intime konatiĝas kun la penso de Ceresole, per tiu lasta oni intime vivas liajn travivaĵojn. Ambaŭ libroj formas tuton kaj valoras studon.

Hélène Monastier, kvankam fidela al sia denaska protestanta eklezio, aliĝis en 1936 al la kvakera societo. Ŝi fariĝis la unua respondeculino de tiu movado en Svislando. Sub ŝia konduko tiu societo, al kiu ankaŭ apartenis Edmond Privat, ludis gravegan rolon havante influon, kiu enorme superis tiun de la aliaj religiaj movadoj, se oni komparas la nombron de la anoj. Se hodiaŭ la virinoj de la francelingvaj kantonoj de Svislando ricevis la voĉdonrajton, tio estas grandparte la frukto de la senlaca agado de tiu etega kvakera societo, kiu, sub la gvidado de Hélène Monastier kaj kelkaj aliaj viglegaj membroj, konstante rememorigis al la viroj, ke la virinoj samvaloras.

La 2-an de decembro Hélène Monastier festis sian 80-an naskiĝfeston ĉirkaŭata de siaj plej karaj geamikoj. La gazetoj montris al ni ŝian belan vizaĝon de radiantaj kaj eterne ridetanta maljunulino, kiu restas esper-plena por la morgaŭa mondo. Ŝi kredas, ke la homoj iam forlasos siajn disputojn por konstrui, laŭ la ekzemplo de Pierre Ceresole, pli homecan mondon.

Vi aŭdis prelegon en esperanto el Svislando. Parolis Claude Gacond, la sekretario de Esperanto-Edukistaro de Svislando, pri Hélène Monastier, la granda svisa civilistino.

-oOo-